

Robert T. Odeman,
Saĝa ĝardenisto

tradukita de Adolf Sproeck

Kontraŭ ĝardenista maniero
mi surverŝas plantojn de l' ĝardeno
per konjako, rumo kaj biero.
Planto vivas en ebria sveno.

Kial agas tiel mi mistere?
Multajn tio ege interesas:
Kuracisto mia tre severe
ĉian alkoholon malpermesas.

“Via manĝo estu vegetara,
tiam repuriĝos korpo via.”
La afero estas tute klara.
Mi nun vivas laŭ ordono lia.

Tial mi depost semajnoj bone
la ĝardenon speciale malsekigas,
manĝas ĝiajn fruktojn laŭordone.
La doktoron tio tre mirigas:

“Tiu kazo estas tre malklara.
Kvankam tute laŭ ordono mia
via manĝo estas vegetara,
pli ol iam estas vi ebria...”

*Traduko de la Germana poemo “Der kluge Gärtnersmann” de ROBERT T. ODEMAN (Bürgerlicher Name: Martin Hoyer, *1904-11-30 – †1985-01.14) en Esperanton de ADOLF SPROECK (*1890 – †1978-03-25).*

Arg-534-1066 (2010-04-12 23:17:53)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝis presita en la revuo “La Praktiko”, n-ro 11 (361), 31-a jaro, novembro 1967. Vidu ankaŭ la retan poemkolekton www.literaturo.dk sub <http://www.literaturo.dk/valdemaro.htm>. Pri la tradukinto Adolf Sproeck troviĝas informoj en http://eo.wikipedia.org/wiki/Adolf_Sproeck.

Robert T. Odeman,
Der kluge Gärtnersmann

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas ROBERT T. ODEMAN (Bürgerlicher Name: Martin Hoyer, *1904-11-30 – †1985-01.14).*

Arg-534-1065 (2010-04-13 16:18:36)

Angaben über den Verfasser Robert T. Odeman siehe unter http://de.wikipedia.org/wiki/Robert_T._Odeman.